WIKIPEDIA

Suprasoraba lingvo

La **suprasoraba lingvo** estas okcidentslava lingvo, kiu estas parolata en orienta Germanio ĉirkaŭ la urboj Bautzen, Kamenz kaj Hoyerswerda. Ĉi tiu lingvo estas parenca al la malsuprasoraba, ĉeĥa, pola kaj kaŝuba lingvoj. Kiel slava lingvo la suprasoraba apartenas al la hindeŭropaj lingvoj.

Ĝi estas la varianto de la Soraba lingvo en la regiono de la urbo Bautzen. Ĝi estas plejparte parolata en Supra Luzacio. Menciindas la televida programo Wuhladko en la lingvo, ekde 2001 elsendita ĉiumonate de Mitteldeutscher Rundfunk (MDR).

Suprasoraba	
Hornjoserbšćina	
Parolata en	Germanio
Regiono	Supra Luzacio
Parolantoj	20,000–25,000[1]
Skribo	Latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa	
Slava	
Okcidentslava	
Soraba lingvaro	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Supra Luzacio (Saksio/Germanio)
Reguligita de	Upper Sorbian Language Commission
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	hsb
ISO 639-3	hsb
SIL	hsb (http://www.sil.org/iso639-3/codes.asp?order=639_3&letter=h)
Glottolog	uppe1395
Angla nomo	Upper Sorbian
Franca nomo	haut-sorabe
Vikipedio	

Enhavo

Alfabeto
Gramatiko
Apartaĵoj
Literaturo
Vivu ankaŭ
Referencoj
Eksteraj ligiloj
Vortaroj
Pliaj

Alfabeto

La suprasoraba lingvo estas skribata en varianto de la latina alfabeto kun la sekvaj aldonaj literoj: **č** [t͡ʃ], **ć**, **dź**, **ě**, **ł** [w], **ń**, **ó**, **ř**, **š** [ʃ], **ž** [ʒ].

Pli pri la alfabeto troviĝas en la artikolo soraba alfabeto.

Gramatiko

La **suprasoraba lingvo** havas 7 kazojn kaj 3 gramatikajn numerojn, krom singularo kaj pluralo ankaŭ dualon.

Apartaĵoj

Ĝia plej grava trajto, kiu distingas ĝin de la malsuprasoraba lingvo estas la ŝanĝiĝo de g al h, kiel ekz. *hłowa* "kapo" (k-u malsuprasorabe *głowa*).

Literaturo

Handrij Zejler (germane *Andreas Seiler*; 1804-1872) konsideratas la fondinto de la moderna poezio en la suprasoraba lingvo, kaj kreinto de la fundamentoj de la nacia kulturo en tiu lingvo.

Vivu ankaŭ

- Wuhladko

Referencoj

1. ↑ laŭ *Sorbisches Kulturlexikon* (eldonita de Franz Schön kaj Dietrich Scholze). Bautzen: Domowina-Verlag. p. 291.

Eksteraj ligiloj

Vortaroj

- Suprasoraba-germana ortografia vortaro (http://www.boehmak.de/sn.html) suprasorabe, germane
- Germana-suprasoraba ortografia vortaro (http://www.boehmak.de/) germane, suprasorabe
- Wortschatz.de (http://corpora.informatik.uni-leipzig.de/?dict=sorb) angle
- Lingvopraktikaj kontribuoj kaj ekzercoj (http://www.uni-leipzig.de/%7Esorb/seiten/hsb/05/recnopraktiske/sprachpraktische-hsb.html) suprasorabe
- Parolturnoj, faka terminologio, leksikaj ekzercoj (http://www.uni-leipzig.de/~sorb/seiten/hsb/05/leksikaliske/lexikalische-hsb.html) suprasorabe

Pliaj

- Vikivortaro: Prononco kaj sonoskribo suprasorabe

Soraba setlejo en la jaro 1843

Slava lingvaro

Okcidentslavaj	ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo)
Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo •

Orientslavaj	serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ... belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Suprasoraba_lingvo&oldid=6998216"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 22:21, 21 jul. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.